

Waterloo Ponto



Waterloo Ponto konstruiĝis dum la fruaj jaroj de la pasinta jarcento, kaj rekonstruiĝis lastatempe. Sed, ne kredu, ke oni konstruis la ponton, kiel monumenton dediĉitan al la batalo. Kelkajn jarojn antaŭ tiu batalo oni formis kompanion por konstrui ponton inter la Strand kaj Lambeth. Unue, oni devis batali kontraŭ la kontraŭstaroj de la instancoj de la Civito de Londono. Tiam estis disputo, ĉu la ponto estos el ligno aŭ el ŝtono. Fine, en la jaro 1811, oni solene metis la fundamentan ŝtonon. La konstruo de la ponto plenigis plurajn jarojn. Dumtempe, venis la « Centtagoj » de Napoleono, kiuj kondukis lin al renkonto kun Wellington ĉe Waterloo. Fine, oni prokrastis la malferman ceremonion de la ponto, por ke tiuj ritoj okazu e la unua datreveno de la batalo. Do, anstataŭ la originala nomo de Strand

ponto, oni preferis ke Waterloo Ponto estu ĝia nomo. Ĝi estis certe la plej bela el la pontoj de Londono. Ankaŭ, ho, ve, la preferita ponto de la sinmortigantoj. Strange, ĉu ne, ke eĉ sinmortigo estas afero de modo !

Iam la poeto Tom Hood ĉeestis kiam oni eligis el la rivero apud ĉi-tiu ponto la kadavron de junulino. Kiel poeto li ne kulpigis ŝin, kiel oni tro facile faris pro ŝia ribelo kontraŭ la leĝoj de Dio, kaj de la socio. Li vidis, ke la socio estas kulpa. Kaj li verkis poemon pri tiu ponto, kiun li nomis « la Ponto de ĝemoj ». Ĝi estas longa poemo, tamen mi kuraĝis imiti kelkajn strofojn por doni al tiuj, kiuj ne bone konas la anglan literaturon ideon pri ĝia stilo, kaj interno.

1. Unu denove jen
Laca pro sort'
Per tro impeta pen'
Fuĝas al mort'
2. Levu ŝin do kun zorg'
Per pia man'
Ho la gracila korp'
Preskaŭ infan'
3. Ĉu estas vera fam'
Ke la kristana am'
Estu nur ŝajn'
Ĉu sur mil stratoj ne
Staras kompat' ho ve !
Nek hejm' ia ajn ?

4. Nek fenestroj de varma lum'
Nek la homara zum'
Nur nigra ond'
Havas allogon nun
Iun ajn lokon nun
Ekster ĉi mond'
5. Ne ribelulino nek
Laŭ tiu fina pek'
Taksu ni ŝin
Restas eraroj ne,
Restas misfaroj ne,
Jen nur virin'

6. Unu denove jen
Laca pro sort'
Per tro impeta pen'
Fuĝis al mort'
7. Levu ŝin do kun zorg'
Per pia man'
Ho la gracila korp'
Preskaŭ infan'.

La ŝtonaĵojn, kiuj oni uzis por konstrui la unuan Waterloo Ponto oni elfosis el kampo sude de la rivero. Oni tiris la materialon laŭ tramvojo, ne per lokomotivo, sed per ĉevalo.

Samuel Smiles en sia « Lives of Engineers » (Vivoj de la Inĝenieroj) rakontas, ke preskaŭ la tutan materialon tiris unu sola ĉevalo. Tiu ĉevalo « Old Jack » (La maljuna Joĉjo) estiĝis tre amata de la laboristoj. Ĝia kondukanto, Tomĉjo, estis bravulo. Tamen, plaĉis al li trinki glaseton de io antaŭ matenmanĝo. Bonŝanĉe, proksime de la fervojo, inter

la ŝtonejo kaj la ponto troviĝis trinkejo. Kaj, ĉe ties pordo, Tomĉjo kutimis haltigi Joĉjon, malsupreniri de sur la tramveturilo, kaj eniri la trinkejon por trovi sian glaseton. Nu, foje, Tomĉjo restis en la trinkejo iom pli longtempe ol kutime. Joĉjo senpacienĉiĝis. Do, ĝi enmetis la kapon laŭ la pordo de la trinkejo kaj prenis inter siaj dentoj la kolumon de Tomĉjo (Smiles aldonas, ke ĝi faris tion tre delikate). Kaj tiel la fidela ĉevalo fortiris sian mastron for el la trinkejo, inter liajn kunulojn por daŭrigi sian laboron.

J.-G. FOWLER.